**EKO**

**Esperiga Komuniko**

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

**Enhavo**


- AMO – fino de la virtuala epoko?
- AMO en perspektivo: 65-68
- AMO 65 kaj 66 sub la lupeo
- Universitata laboro plue kaj rete


Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-32 sendita el Budapeŝto, la 15an de junio*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# AMO en perspektivo

Post multa laboro ni pretas anonci la konturojn de la AMO-programo tra la sekvaj monatoj.

**AMO 65:** 27a de junio. <Landaj Asocioj – Leviĝantaj Agantoj>. Tekniko: Irano.

**AMO 66:** 31a de julio. <Instruistoj – iliaj roloj, taskoj kaj respondecoj. En VEKI de ILEI.

**AMO 67:** 13a de septembro. <Varbado de junuloj en Eŭropo>. Vroclavo. Tekniko: Irano.

**AMO 68:** ekde oktobro 25 - 31. <La rolo de Eo-Centroj>. Kulturcentro Greziljono. Fizika seminario.

AMO 65 ĝis 67 okazos virtuale, AMO 68 fizike (kaj eble rete) oktobrofine. Restas eblo por unu jarfina seminario. AMO 65, 66 kaj 67 okazos kadre de la Monda Fest de UEA, AMO 66 pere de la Virtuala Esperanta Kongreso de ILEI (VEKI).

# AMO 65 – Landaj Asocioj – Leviĝantaj Agantoj

Ni bezonas ankoraŭ prezentantojn kaj forumanojn. Bv. ege baldaŭ anonci vin al mi! Ni havas kelkajn kontribuantojn. Ni volus reprezentanton de ĉiu kontinenta komisiono, sed pli ol unu ne respondis al ni alvoko! Ne ĉiu levas sin.

smg

# AMO 66 – ILEI aktive proponas programon

pri AMO (Aktivula Maturigo): instruistoj estas aktivuloj. Ni koncentriĝos pri instruistoj:

INSTRUISTOJ GVIDAS LERNADON
(mi ne skribis : transdonas sciojn….)

- iliaj taskoj
- iliaj respondecoj
- iliaj devoj
- ilia motivado



du podiaj diskutoj estas formataj pri tio, po unu por ĉiu tempo-regiono.

INSTRUISTOJ ESTAS HOMOJ KUN INFANOJ KAJ JUNULOJ

Ĉu pli da viroj, pli da virinoj?
Ĉu tuŝi aŭ ne tuŝi ?
Ĉu bati aŭ ne bati ?
Ĉu puni aŭ ne puni ?
Perdo de prestiĝo, malfacila profesio
Junulinoj tentas instruistojn

Mirejo Grosjean

# Interkultura komunikado alvenas per la reto

La planita **5a Interlingvistika Simpozio** en la Adam-Mickiewicz-Universitato, en Poznano (Pollando) okazos **rete** 17-18.09.2020. (ĉar la surlokaj agadoj en la universitato estas nuligitaj ĝis la 30a de septembro) kun la anoncita temo '**Rolo de lingvoj en interkultura komunikado**' Informojn vi trovos en la retejo de la Studoj: http://interl.amu.edu.pl



La limdato por aliĝo estas plilongigita ĝis la 15a de julio 2020. Eĉ se vi ne prelegos, anoncu vin, ĉar ni havos limigitajn lokojn.

La bildo:
kelkaj siatempaj kursanoj

**Konfirmitaj prelegantoj:**

Prof. Věra Barandovská-Frank, Prof. Nicolau Dols Salas, Prof. Sabine Fiedler, prof. Federico Gobbo, Prof. Przemysław Grzybowski, Prof. Wim Jansen, Prof. Goro Kimura, Prof. Ilona Koutny, Dr Katalin Kováts, Jan van Steenbergen, Dr Ida Stria, Prof. Bengt-Arne Wickström

Prof. Dr hab. Ilona Koutny
Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj kaj la Hungarologia Katedro
Universitato Adam Mickiewicz

========= Vortoj: 370 ===========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/18. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.